

Recenzo de *La Verdkata Testamento* de Raymond Schwartz
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 588, 1975.01.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Delonge la esperantistoj ne povis tralegi la libron de Raymond Schwartz : **Verdkata Testamento**. Nun tiu manko estas riparita, tio dank'al la eldonemo de Dansk Esperanto Forlag, kiu tipofsete represis la eldonon de 1929 kun antaŭparolo de Reinhard Haupenthal.

A.- Kiuj ŝatas la ŝvarcaĵojn do aĉetu la libron **Verdkata Testamento**, aron da poeziaĵoj verkitaj por la esperanta kabareto **Verda Kato**. Tiuj tekstoj, kiel diras Haupenthal en la antaŭparolo, bezonus komentariojn, ĉar kabaretoj vivas de aktualaĵoj. Kaj ni pro tio bedaŭras, ke oni kontentiĝis nur fotorepresi la eldonon de 1929. Povu foje aperi kompleta verkaro de Raymond Schwartz kun ĉiuj necesaj komentarioj, sub formo de notoj. Ankaŭ estus interese povi trovi la notojn de la melodioj, kiuj permesus kanti la poemojn.

Cl.- La intereso de tiu libro ĉefe troviĝas flanke de la lingvaĵo. Raymond Schwartz konstante vort-ludas, kaj tio pere de la lingvo, kiun neinformitoj kredas nura seka kodo. Se tiu kodo fariĝis vivantaĵo, tio estas parte unu el la rezultoj de la ŝvarca ŝercemo, kiu iom post iom infektadis grandan parton de la esperantistaro. Legante la verkon *Verdkata Testamento*, estas interese konstati, kiom da vortludoj, kiuj en la jaroj dudekaj estis tute novaj, nun fariĝis rebataĵoj, kiujn oni ofte aŭdas en ĝojaj renkontiĝoj junularaj. Se la libro ne plu estis havebla, almenaŭ la lingva heredaĵo restis, kaj tio fine estas la plej grava afero.

A.- En sia enkonduko titolita *Serioza neseriozeco* Reinhard Haupenthal diras, ke Gaston Waringhien en eseo kaj Reto Rossetti en la verko *El la maniko*, klopodis analizi la ŝvarcan lingvo-uzon. Kaj li listigas la ĉefajn karakterizojn.

Cl.- Unue oni registru la **kalamburon ĉarniran aŭ ŝaradan**. Waringhien nomas ĝin **mistranĉo**. Efektive temas pri morfem-ludo, kiu estas senfine ekspluatebla. Ekzemploj : **karnavalo – karna valo ; virt-emo – vir-temo ; katastrofo – kata strofo ; kuraĝo – kur-aĝo ; bandaĝo – band-aĝo ; Ĉiu virino havas sian menstruon – ĉiu virino havas sian mens-truon**, ktp.

A.- Aliajn fojojn Raymond Schwartz **redividas kunmetaĵojn**. La **stranga** butikoj – **last-ranga** butikoj; *L'Avarulo* de Molière, kiu banaliĝas je **lava rulo ; rem-aĉi – re-maĉi ; ferakonto – fera konto**.

Cl.- Aliajn fojojn Schwartz ŝanĝas sonon. Necesejo fariĝas ne-ĉesejo; **klasbatalo – glasbatalo; Esperanto – edz-peranto; liturgio – litorgio**, ktp.

A.- Schwartz ŝatas modifi iujn citaĵojn. **Ĉu esti aŭ ne esti?** fariĝas **Ĉu vesti au ne vesti** la genuojn ?

Cl.- Misliterumo ankaŭ vekas la ridon. Jen ekzemploj: **ribelo – libero; skoto – kosto; latino – italo**; faru **kafopaŭzon**, vi ne havos **pafokaŭzon**. Laŭ Waringhien, tiu speco de vortludo ofte prezentas kontraston inter banalaĵo unuflanke kaj nedecaĵo aliflanke : rigardo **palpebruma – mano brulpalpema ; fokstroto – koksfroto**.

A.- Kaj nun ni legu kelkajn versaĵojn el la kolekto **Verdkata Testamento** de Raymond Schwartz :

Cl.- *El dek fiŝistoj ĉiu
Preparas unu reton,
Ministro samcele
Eniras kabineton,
Kaj malgraŭ diverssenco
Ne estas diferenco !
(La dek fiŝistoj kaj la
Ministro preparas
... **dek retojn** !)*

Dekretojn !

A.- Knabino noblakora
Al virtaj ecoj emas,
Dum inter viroj ofte
Pri malĉastaĵoj temas,
Kaj malgraŭ diverssenco
Ne estas diferenco !
(En ambaŭ okazoj estas
... **Virt-emo** !)

Cl.- **Vir-temo** !

Cl.- Kaptiloj ofte havas
Kaŝitan kapt-risorton
Kaj la sekretarioj
Tro ofte fruan morton,
Kaj malgraŭ diverssenco
Ne estas diferenco!
(En ambaŭ okazoj estas
...**Sekreta risorto** !)

A.- **Sekretari-sorto** !

A.- Post tiuj citaĵoj el la poemo *Ne estas diferenco*, jen du aforismoj :

Cl.- La piro kreskas sur la **arbo**,
sur viro kreskas nur la **barbo**.

A.- Prudenta hom' ne iras, vere,
Al necesejo senpapere !

Cl.- (Tiujn aforismojn plej zorge **deklamu**,
por ke neniu el tiuj **dek lamu** !!)

A.- Pri la titolo **Kata strofo**, jen kion skribis Schwartz :
Se kun junulo kaj junino
Komence ludas la satano,

Sendube ili ĉe la fino
Ludados plu kun... suĉinfano !!

Cl.- Kaj nun pri *Naciaj nomoj en esperanto* :

Se knabino hispanida
Ĉion – pro don-em' senbrida
Dis**donacas** malavare,
Ŝi nomiĝos, estas klare :
Dona Canta !

A.- Italino facilhora,
Se ŝi estas kis-fervora,
Kisojn vendas kontraŭ **mono**,
Certe estis ŝia nomo :
Mona Kisa !

Cl.- Kaj se ruso ĉirkaŭ **Pasko**
Ĝojas pro feliĉa nasko
De infano, li kun ŝanco
Nomos ĝin laŭ cirkonstanco:
La Paskova!

A.- Se naskiĝas ĉe japano
Kripligita **fuŝ**infano,
Se grimacas ĝi malbele,
Ĝi nomiĝos ĝustacele :
Fifuŝita !

Cl.- Tiajn poemojn kaj multajn aliajn vi trovos en la ĵus reaperinta libro de Raymond Schwartz : **Verda Testamento**.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!